# *ALBA-TCP kunvenigas naciajn kunordigantojn pri strategia planado*



Havano, jun 8 (RHK) La Bolivara Alianco por la Popoloj de Nia Ameriko-Popola Komerca Traktato (ALBA-TCP) okazigis labortagon kun la naciaj kunordigantoj de siaj 10 membrolandoj  en Karakaso.

La renkonti?o, okazigita per videokonferenco, analizis la geopolitikan situacion, same kiel la vojojn por atingi la malsamajn horizontojn de la Strategia Tagordo ALBA 2030, aprobita la 24-an de aprilo en Karakaso dum la XXIII Pintkunveno de ?tatestroj kaj Registaro de la bloko integriga.

La plenuma sekretario de la latinamerika kaj kariba mekanismo, Jorge Arreaza, raportis sur platformo X, ke ili debatis pri la sistemo por atento kaj mastrumo de riskoj cele al starigo de Agentejo de Kunlaboro por Evoluigo de ALBA-TCP. Anka? pri la "?isdatigita studo de niaj ekonomioj por anta?enigi ilian produktivan kaj komercan komplementecon."

?i tiu Strategia Tagordo havas kvin horizontojn: ekonomian, politikan, socian, kulturan kaj komunikan, kaj inkluzivas proponojn pri agoj de alta efiko en la mallonga kaj meza limtempo.
En la virtuala renkonti?o, ili denove konsentis postuli ke "Va?ingtono tuj forigu Kubon de tiu falsa listo de landoj kiuj sponsoras terorismon."

La fina deklaracio de la pintkunveno en la pasinta aprilo postulis la ekskludon de la insulo de tio, kion ?i nomis "spura kaj arbitra unuflanka listo de landoj supozeble sponsorantaj terorismon", preparita de la ?tata Departemento de Usono.

Li denuncis, ke tio havas negativan efikon al ?iuj sferoj de la kuba socio kaj al la bonfarto de ?ia popolo, "per intensigo de la krima ekonomia milito kaj pliigo de la malfacila?oj" por eniri internacian komercon, fari financajn operaciojn kaj akiri bazajn provizojn.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/356839-alba-tcp-kunvenigas-naciajn-kunordigantojn-pri-strategia-planado

Radio Habana Cuba